kun sia edzino. Ĉio evoluas en la vivo, mi supozas ke por la bono, kvankam survoje ĉiam troviĝas ŝtonoj kiuj malhelpas nian iradon. Aliaj kurioza frazeto estas **liberigi la esperantistojn de ĉia suspektebla solidareco kun niaj privataj politikaj konvinkoj.** Mi konsideras ĉi tiun koncepto altrudita al la esperantistaro, absolute ne akceptebla. Ĉu mi ne povas esti solidara kun miaj privataj konvinkoj ĉu politikaj ĉu religiaj? Tiu konsilo de Zamenhof pensigas min pri la influo de la politiko kaj religio en tiuj tempoj. Ĉu la politiko kaj la religio estis malfavoraj al Esperanto? Almenaŭ mi, hodiaŭ nepre estas solidara kun mia, laŭ vidpunkto privata, kun aliaj personoj, kies pensoj politikaj aŭ religiaj estas similaj al tiuj miaj. Se mi ne sentus tian solidarecon, kia samideano mi estus? Kompreneble, ke tiun senton mi aplikas ankaŭ al miaj Esperantaj gesamideanoj. Kaj se tiu sento al la esperantistoj koincidas kun tiuj aliaj politikaj aŭ religiaj, mi jam estus duobla samideano. En tiu priskribo rilate al solidareco de la **Plena Ilustrita Vortaro 2005**, estas io kion mi ne komprenas: **Kiel interdependa respondeco pri ŝuldoj, mondevoj... la solidareco de la heredintoj.** Mi ne scias, kia estas solidareco de la heredintoj, ĉu temas pri la Esperanta heredo al niaj filoj? Eble en tiuj tempoj, tiu deklaro pri la solidareco estis ĝusta kaj justa. Aŭ la penso de Zamenhof iris for de la limoj de la esperantismo. Ĉar Esperanto estas solidara kun ĉiuj kaj ne povas fari distingojn kun tiuj, kiuj scias aŭ ne scias Esperanton. Sed fakte Esperanto estas lingva movado, kiu povas esti ege valora en la homa komunumo, sed ni ne forgesu ke ĝi estas movado lingva. Apliki ĝin en ĉiuj facetoj de la vivo estas nia devigo. Ĉu tio signifas, ke ni povas esti solidaraj kun aliaj personoj, evidente ni povas helpi aliajn personojn solvi la lingvajn problemojn. Tamen ni devas kompreni kaj akcepti, ke la solidareco estas homa ago kiu anstataŭas taskojn, kiuj jam devis esti plenumitaj de la socio. Jes, ni pere de nia Esperanto-movado povas solidare helpi aliajn grupojn. Sed la demando estas, kial se ni havas la kapablon solvi tiujn sociajn problemojn la koncernaj aŭtoritataoj ne kapablas starigi leĝojn, por oficialigi Esperanton? Do la solidareco en ĉi tiu tereno lingva, se vi serioze pensas la aferon, povas konstati, ke nia solidareco funkcias kontraŭ ni mem, ĉar nia interveno evitas, ke la aŭtoritataj diktu specialajn leĝojn por la instruado de Esperanto. Ĉi tio dirite tiamaniere ŝajnas granda absurdo, kaj fakte ĝi estas vera absurdaĵo, ke konante la rimedojn, ĉiam parolante pri la lingva problemo, ni troviĝas en sama situacio. Eble tiu priskribo de la **PIV** bezonas adaptiĝi al novaj tempoj, al la nova pensomaniero de la homo. Estas evidente ke nuntempe tiuj aspektoj de solidareco, esprimitaj en la vortaro, estas iome kadukaj. Tamen mi jam scias, ke nia solidareco lingva kiam ĝi estas petata al ni neniam mankas nia helpo. Eble ni devas esti iomete pli postulemaj. Eble ni devas valorigi multe pli niajn agadon kaj respondecon. Mi jam scias, ke la afero estas grava kaj mal-facila, sed ni devas eliri de ĉi tiu cirklo en kiu ni enfermiĝis.
Ni lasu flanken la rilatojn de la solidareco en la Esperanta movado kaj ni iru al la mondo, al tiu vasta mondo en kiu ekzistas tiom da konfliktoj pro diversaj kialoj. Mondo, kiu en sia aktuala koncepto kaj propra disvolviĝo bezonas multan helpon, se ni ne deziras, ke duono el la homaro pereu meze de tiu alia mondo, en kiu oftas la diboĉado de la necesaj aĵoj kiuj estas tute bezonataj por vivi, por iri antaŭen. Ni ne bezonas longe pensi por scii, kion ni devas fari, kien kaj al kiuj ni devas apliki la nomatan solidarecon. Nia kara mondo estas plena da mizero, mizero, kiu por iuj signifas ne kontentige manĝi kaj por aliaj signi-fas povran kaj mizeran menson kiu ne volas aŭ ne povas kunlabori por estigi mondon pli perfektan, pli justan. Jes, karaj gesamideanoj, por mi la teniĝo de multaj personoj estas abomeninda, kiam ili vidas ke apud sia hejmo estas aliaj homaj estaĵoj kiuj suferas pro malĵusteco kaj ili faras nenion. Ho ve! De tempo al tempo ili faras iujn donacojn, kaj pensas ke ili jam faris sufiĉe por tiuj malfeliĉuloj.
Sed ni venu al konkretaj kazoj. Estas la tempo de la Kristnasko, la epoko de paco kaj feliĉo. Vi jam povas konstati, ke abundas donacoj dum ĉi tiuj tagoj de la jaro. Ĉiu estas preta helpi al tiu malfeliĉa homo, kiu vivas surstrate, ke lia hejmo estas granda kartona skatolo. Kaj nun kun nia fama informa medio, la televido, la homoj, profitas la okazon por, unualoke, reteni sian laborpostenon, due la geartistoj de la televidkanaloj sin prezentas al la publiko, por ke la spektantaro konu la situacion en kiu vivas multaj homoj kaj, samtempe, kiel helpi al tiuj mizeruloj. Post adekvata prezentado komenciĝas la televizia parolisto, instigi la rigardantaron, ĉar ni devas esti solidaraj, kun tiuj malfeliĉuloj, kiuj ne havas hejmon nek nenion por manĝi. Post longa parolado la prezentisto denove prononcas la vorton solidareco. Li reliefigas la valorojn de la membroj apartenantaj al nia komunumo, kiuj tiom helpas la mizerulojn. Kaj, kial ili estas mizeruloj? Neniu respondas. Kaj ne nur oni alvokas al la solidareco, ke eĉ oni mencias la karitaton. Oni mencias la solidarecon, kiel unu el la grandaj valoroj de nia socio en kiuj ni vivas, tiu valoro tute simple estas laŭdi la maljustecon de nia amata sociordo, ĉar implicite oni rekonas, ke estas mizero kaj maljustaĵoj. Estas informaj medioj kiuj faras kolektojn, por esti solidaraj kun tiuj membroj de la socio, kiuj estas en malbonaj kondiĉoj. Kaj la radioaŭskultantoj aŭ la televido-spektatantoj malavare donacas monon por helpi tiujn malfeliĉulojn. Oni ne pensu, ke tiuj donacoj estas senprofitaj, ĉar anonco de entrepreno pro ĝia